n-ro 68

aprilo 2000

# La Merkato

ISSN 0941-9306

**<u>Inkotermoj 2000: senpage por fidelaj membroj (v. ankaŭ p. 4)</u>**

IKEF esperas prezenti la esperantan version de Inkotermoj 2000 dum la venonta UK. Ĝi kostos proksimume 18 EUR. La fidelaj membroj rajtas je senpaga ekzemplero. "Fidela" estas membro kiu (antaŭ)pagis minimume 5 jarkotizojn <u>kaj</u> pagis la kotizon por la nuna jaro. Dumvivaj membroj kompreneble plenumas tiujn kondiĉojn. Membroj kiuj deziras ricevi senpagan ekzempleron konfirmu tion plej laste je 20 junio 2000 al mi aŭ pere de sia peranto. Samtempe ili povas eventuale indiki alian sendadreson.
Por la ceteraj membroj estas aldonita slipeto kun indiko de la nombro de bezonataj aldonaj kotizpagoj.

Roland Rotsaert <rotsaert(a)esperanto.be>

**<u>Enhavo</u>**

Raporto pri 1999 . . . . . . . . . . 3-7
Financa raporto pri 1999 . . . . . . . . . . 8-10
Thomas A. Goldmann mortinta . . . . . . . . . . 11
Anoncitaj aranĝoj - Komercaj petoj kaj proponoj . . . . . . . . . . 12
Kunlaboro por laboro (Jugoslavio) . . . . . . . . . . 14
Terminologio . . . . . . . . . . 15
Reago al "Fikciaj entreprenoj ne bonvenas" (LM67) . . . . . . . . . . 16

**La Merkato** (LM)(ĝis numero 26: Laŭokaza Novaĵletero) estas organo de IKEF. Ĝi aperas kvaronjare (jan-apr-jul-okt) kaj servas al la membraro kiel komunikilo. Redaktoro: Roland Rotsaert. Limdato: mezo de la monato antaŭ apermonato.

La **Identecŝildaro** - iam dujara eldono - ne plu aperas. Anstataŭ ĝi, membroj povas aperigi siajn personajn informojn en La Merkato. Ĉiujare ili ricevas kompletan membroliston.

La **Estraro de IKEF**: S-ro Franz Josef Braun, Prezidanto kaj Ĝenerala Sekretario; S-ro Roland Rotsaert, Financa Konsilanto; S-ro François-Xavier Gilbert; S-ro Zoltan Könyves; D-ro Rainer Kurz; S-ro Seikô Yamasaki; S-ro Wang Tianyi

**Revizoro por la financa raporto**: D-ro Gianfranco Polerani.

**Centra sidejo**: Ĉe s-ro F.J. Braun, Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl, Germanio.

**Financa sidejo kaj membrara administrado**:
Ĉe s-ro Roland Rotsaert, Visspaanstraat 97, B-8000 Brugge, Belgio,
telefono/fakso/respondilo: +32-50-330004; retpoŝto: rotsaert(a)esperanto.be.

---

IKEF-informoj en Interreto: http://komerco.com/ikef (provizore ne aktualigitaj)

---

La jara **membrokotizo** estas 15 eŭroj (EUR) por landoj laŭ UEA-kategorio "A" ("riĉaj landoj") kaj 10 EUR por landoj laŭ UEA-kategorio "B" ("malriĉaj landoj"). Egalvaloro en konverteblaj valutoj (ekz. usona dolaro - USD) kaj internaciaj respondkuponoj (IRK - kun stampilo de eldoninta poŝtoficejo) estas akceptataj. Kurzoj estas proksimume 1 EUR = 1 USD = 1,20 IRK.
Dumviva membreco akireblas per unufoja pago egalvalora al 20-obla membrokotizo.
Por pago per kreditkarto sendu instrukcion al Flandra Esperanto-Ligo.

**Kontoj**: - ĉe UEA kaj FEL: kodo ikef-c
- belga poŝtĉekkonto (Bruselo): numero 000-1592629-83

**Perantoj**

*Belgio kaj internacie*: Flandra Esperanto-Ligo (fakso 03-233.54.33, retpoŝto financoj(a)fel.esperanto.be, belga pĝk. 000-0265338-43)

*Ĉeĥio:* S-ro Vladislav HASALA, A. Dvořaka 1, CZ-696 62 STRAŽNICE; tel./fakso/reg.420-631-332507, retpoŝto vlada_hasala(a)iol.cz

*Ĉinio*: S-ro WANG Tianyi, Xi'an Jiangong-lu 3, CN-710043 Xi'an, telefono + fakso 0086-29-2232952, retpoŝto komerco(a)public.xa.sn.cn

*Francio*: S-ro François-Xavier GILBERT, 33, rue Louvière, F-55190 Void-Vacon (CCP 1275-89 L Nancy), tel. kaj fakso +33(0)3.29.89.82.15, retpoŝto efikso(a)aol.com

*Germanio*: S-ro Franz Josef BRAUN, Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl (Volksbank



Bühl, n-ro 713120, BLZ 66291400), tel. 07223/942064, fakso 942065, retpoŝto f.j.braun(a)t-online.de

*Hungario*: D-ro GETHER István, Palóc u. I, H-1135 Budapest XIII

*Italio:* D-ro Gianfranco POLERANI, Viale G. Suzzani, I-20162 Milano, retpoŝto g.polerani(a)agora.stm.it (poŝta konto 37485208)

*Japanio*: S-ro YAMASAKI Seikô, J-185-0014 Tôkyô, Kokubunzi, Higasi Koigakubo 3-18-12, retpoŝto syama(a)dokkyo.ac.jp (pĝk. n-ro 00160-3-253232, kotizo 2200 enoj)

**Administrado - Grava atentigo al niaj membroj**

1. La estraro prezentas sur la sekvaj paĝoj sian raporton pri la agado de IKEF dum la jaro 1999 kaj proponas aprobon de tiu raporto.

2. La estraro prezentas sur la paĝoj 8-10 la financan raporton de IKEF por la jaro 1999, notante ke la ciferoj estas prezentitaj en bona tempo al la revizoro. Je redaktofino (8 aprilo 2000) la respondo de la revizoro ne estis ricevita. Ni informos la membrojn pri lia opinio en la venonta numero.

3. La estraro notas la sumon de financa profito de 729,46 EUR kaj proponas la aldonon de tiu profito al la kapitalo.

4. La estraranoj s-ro Braun, d-ro Kurz kaj s-ro Wang, ĉiuj elektitaj en 1998, baldaŭ estos du jarojn en sia ofico. Laŭ la statuto de IKEF, alineo 7.1, dua frazo, estrarano tenas sian oficon por du jaroj. Ilia estraraneco finiĝos en julio ĉi-jare. Reelekto eblas. Ĉiuj pretas kandidatiĝi. En la nomo de IKEF, la aliaj estraranoj dankas ilin pro la laboroj faritaj dum la pasintaj du jaroj kaj proponas reelekton de ili.

5. Nia statuto, alineoj 7.4 kaj 8, montras la procedon pri aprobo de la financa raporto kaj de la raporto pri agado. Ĉi-jare ni denove organizos Ĝeneralan Kunvenon por niaj membroj, kadre de la Universala Kongreso de Esperanto en Tel-Avivo, Israelo. Diskutado kaj aprobo de la raportoj (vidu punktojn 1-3 supre) kaj elekto de estraranoj (vidu punkton 4 supre) okazos tie. Membroj kiuj ne povas veni al Tel-Avivo, rajtas skribe komisii alian membron ĉeestontan pri aprobo kaj voĉdonado; tian agon la estraro rekomendas. La precizan daton, horon kaj salonon de nia Ĝenerala Kunveno ni avizos en venonta "La Merkato" komence de julio 2000.

La Estraro de IKEF

**Raporto pri la agado de IKEF dum la jaro 1999**

Rimarkinde kreskinta membraro - stagno ĉe perantoj



La membronombro rimarkinde kreskis de 136 fine de 1998 al 149 fine de 1999. Dum 1999 aliĝis 25 novaj membroj, kio estas rekordo. Bedaŭrinde ni denove devis eksmembrigi 10 personojn pro nepago de kotizo; aldone 2 IKEF-anoj je propra volo ĉesis sian membrecon. Inter la 149 membroj troviĝas 7 dumvivaj.

La nombro de perantoj estis 8, kiel en la antaŭa jaro.

"La Merkato" regule aperis

Ankaŭ dum 1999 nia interkomunikilo La Merkato regule kaj tre akurate aperis kvarfoje.

Terminara Sekcio denove aktivas

Antaŭ unu jaro, por 1998 ni devis raporti pri neaktiveco de tiu sekcio, pro daŭra rifuzo de la terminaraj instancoj de Eŭropa Komunumo pri nia kunlaboro kun ili, al kiu ni estis celanta nian agadon. Post tio ni ŝanĝis nian strategion kaj dum la UK en Berlino en speciala kunveno ni fiksis la ontajn agadojn. Nune ni intencas laŭ propono de la kunordiganto, s-ro YAMASAKI Seiko (IKEF 43), esperantigi la ICC-(Internacia Komerca Ĉambro en Parizo) libron "Incoterms 2000", kiu estas ĝisdatigita priskribo de la kondiĉoj en internacia komerco, ekzemple CIF, FOB, FAS, k.a. Nia estrarano Francois-Xavier GILBERT (IKEF 14) en intertrakto kun ICC atingis la - por ni senpagan - rajton fari tiun tradukon kaj eldonon de limigita kvanto da broŝuroj. Intertempe la laboroj por tio estas sur bona vojo kaj ni celas al prezentado de ĉi tiu broŝuro "Inkotermoj 2000" dum la UK en Tel-Avivo.

Verka agado je nekontentiga nivelo

La verka agado, kiu okazas precipe en "Monato", internacia magazino sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo, estis iom malpli alta ol en la antaŭa jaro. Jenaj IKEF-membroj kontribuis dum 1999 al "Monato" per artikoloj: Gilbert LEDON (IKEF 177), MU Binghua (IKEF 213), Jiri PATERA (IKEF 276), Roland ROTSAERT (IKEF 3), Marc VANDEN BEMPT (IKEF 251), YAMASAKI Seiko (IKEF 43), Zandandu Ntomono ZOLA (IKEF 181). Kompare al tiuj 7 aŭtoroj oni notintis en 1998 11 aŭtoroj. Por

grandaj mondpartoj ankoraŭ mankas kunlaborantoj, kvankam loĝas IKEF-anoj tie.

Ĉe tiu okazo ni denove atentigas niajn membrojn pri la fakto, ke "Monato" rolas kiel ĉefa podio por nia verka agado, kaj ni rekomendas al ili la abonon de "Monato". Krome ni alvokas al aktiva kunlaboro per verkado de interesaj artikoloj por "Monato".

Plie aperis en nia interkomunikilo "La Merkato" kelkaj artikoloj pri ekonomiaj aferoj, inter tiu recenzo (en n-ro 64, paĝoj 16-19) de nia membro Kees RUIG (IKEF 68) pri la libro "Vastas la mondo, multas laboro" de Kim Woo-Chong, fondinto kaj prezidanto de la korea grandfirmao Daewoo. Tiu sufiĉe realisma recenzo, kiu ankaŭ estis publikigita en revuo "Esperanto" de UEA, trovis grandan eĥon.

<u>Kongresaj aranĝoj en 1999</u>

Dum la 84-a UK en Berlino okazis je 3 aŭgusto 1999 la Ĝenerala Kunveno de IKEF kun 55 ĉeestantoj, inter tiuj 28 membroj.

Escepte de s-ro WANG Tianyi (IKEF 117), la tuta estraro sidis sur la podio, kiu ankaŭ signifas novan rekordon. La kunveno plenumiĝis laŭ la tagordo kun vigla diskutado pri la celoj de IKEF. La ĝisnunaj estraranoj s-roj Gilbert, Rotsaert kaj Yamasaki estis reelektitaj; la loko en la estraro de d-ro Gether, kiu rezignis pri plia oficperiodo, estis nove okupita de sia hungara samlandano s-ro KÖNYVES Zoltán (IKEF 77). La ĉefaj temoj - krom la oficialaĵoj - estis la diskutado pri terminara laboro kaj pri la paĝoj de IKEF en Internet. Pri terminara laboro fine troviĝis solvo - vidu supre - , dume por la retpaĝoj la situacio restas ne solvita.

Vere interese kaj informriĉaj estis la vizitoj aranĝitaj de prezidanto Braun en la Ekonomika Fakultato de Humboldt-Universitato kaj en la Industria kaj Komerca Ĉambro, ambaŭ en Berlino. En la Universitato ĉeestis 21 vizitantoj (ĉefe IKEF-membroj, sed ankaŭ aliaj interesitoj), en la Ĉambro 19. En la Universitato nia membro profesoro Bengt-Arne WICKSTRÖM (IKEF 40) kune kun kelkaj de siaj gestudentoj prezentis la taskojn de la Ekonomika Fakultato kaj diversajn aktualajn projektojn. En la Ĉambro la vizitintoj eksciis multon pri la ekonomia



situacio de Berlino (urbo kun 3,5 milionoj da loĝantoj) kaj pri la specialaj problemoj ekestintaj post la reunuiĝo en 1990 de Germanio kaj de Berlino.

Menciindaj estas ankaŭ la prelego kiun faris prezidanto Braun en la Strategia Forumo de la Esperanto-komunumo pri "Rigardoj al la Esperanto-komunumo el vidpunktoj ekonomiaj kaj industriaj/komercaj" kaj la partopreno de s-ro Rotsaert en la Terminologia Kunveno kaj en la Forumo de fakaj asocioj, ĉiuj kadre de la UK en Berlino.

Kune kun TAKE, IKEF funkciigis dum la tuta kongresa semajno komunan standon en la kongresejo en Berlino, en kiu ĉefe deĵoris de nia flanko s-ro Rotsaert kaj flanke de TAKE s-ro Edmond LUDWIG. Nia membro s-ro Hans Peter BARTOS (IKEF 285) povis prezenti sur nia stando sian aparaton UNITTRON (magnet-terapia kuracmetodo) de sia firmao BARTOS Gesundheits-Systeme.

Partoprenis la Azian Kongreson en Hanojo, Vietnamo, okazintan fine de aŭgusto, s-roj YAMASAKI, Josep FRANQUESA, Katalunio (IKEF 228) kaj Atsuo OHBA, Japanio, (IKEF 75), kiuj okazigis apartan informkunvenon pri IKEF. Ĉeestis deko da vietnamaj studentoj. Estrarano Rotsaert konsentis sendi al ili "La Merkato" senpage.

<u>Kunelaboro kun TAKE</u>

La kunelaboro komencinta en 1998 kun TAKE (Tutmonda Asocio de Konstruistoj Esperantistaj) estis daŭrigata ankaŭ en 1999. Krom la komuna stando en la kongresejo (vidu supre) dum la UK okazis komuna estrara kunsido inter ambaŭ asocioj. Krome prezidanto Braun partoprenis la Ĝeneralan Asembleon de TAKE-LA DOMO je 19 septembro 1999 en Wintzenheim, Francio.

La rabatita kotizo por komunaj membroj en IKEF kaj TAKE estas sukcese enkondukita. Jen la aktualaj tarifoj (en EUR):

| | IKEF | TAKE |
|---|---|---|
| normalaj tarifoj por membroj el landoj | | |
| laŭ UEA-kategorio A (riĉaj) | 15,00 | 18,00 |
| laŭ UEA-kategorio B (malriĉaj) | 10,00 | 10,50 |

rabatitaj tarifoj por komunaj membroj en ambaŭ asocioj

| | |
|---|---|
| el landoj laŭ UEA-kategorio A (riĉaj) | 27,00 |
| laŭ UEA-kategorio B (malriĉaj) | 18,00 |

Fine de 1999 nombriĝis 20 komunaj membroj.

Estonte ni kune kun TAKE intencas pritrakti precipe du temojn:
1) organizi komunajn fakseminariojn,
2) havigi staĝlokojn en diversaj landoj por junaj metilernantoj kaj studentoj.

Koncerne 1) en Wintzenheim estis decidita, ke la unua fakseminario okazu kadre de printempa staĝo de 0rientfranca Esperanto-Asocio en Strasburgo en marto/aprilo 2001.

<u>INTERNET-aliĝo kaj retpoŝto plie kreskis</u>

Nia estrarano kaj ĉina peranto, s-ro WANG Tianyi, daŭre registras, aktualigas kaj disdonas al la membroj (kun retaliĝo) la retadresojn de IKEF-membroj. Por tio necesas, ke niaj membroj informu lin pri nova aliĝo aŭ ŝanĝo de adreso. Jen la retadreso de s-ro Wang: komerco(a)public.xa.sn.cn.

Antaŭ unu jaro ni laŭdis sur ĉi tiu loko la agadon de nia tiama membro Bent HOLM, kiu estis prizorganta nian IKEF-an ĉefpaĝon en Internet. Bedaŭrinde li finis tiun laboron senvorte, ne reagis al leteroj kaj ne pagis sian membrokotizon, tiel ke ni eksmembrigis lin. La nuna ne-aktuala stato de niaj Internet-paĝoj estis forte kritikata en la Ĝenerala Kunveno en Berlino. Fine promesis tie s-ro Georges D. WINKLER el Lichtenstejno (Kongres-numero 1017, ankoraŭ ne IKEF-membro) ellabori taŭgan retpaĝan sistemon por IKEF. Bedaŭrinde ĝis fino de la jaro 1999 li ankoraŭ ne komencis pri tio. Do tiu grava problemo estas ankoraŭ ne solvita. Personoj el nia membraro kun spertoj en tiu sfero estas alvokitaj helpi.

<u>Praktikaj agadoj</u>

En magazino "Monato" aperis dum 1999 entute 5 tutpaĝaj reklamanoncoj de germanaj entreprenoj, ĉiuj peritaj kaj tradukitaj de prezidanto Braun. El tio rezultis rimarkinda enspezo por IKEF de 389,74 EUR.



En ĉiu numero de "La Merkato" aperis anoncoj pri komercaj petoj kaj proponoj de E-istaj komercistoj (1999 = 27, 1998 = 22). Ni aperigas ilin senpage por personoj el landoj kun pagoproblemoj.

Ĉinaj membroj WANG Tianyi (IKEF 117), HUANG Zheng Su (IKEF 183) kaj DONG Zhongfa (IKEF 247) faris komercan vojaĝon vizitinte esperantistajn komercistojn en Uzbekio, Kirgizio, Rusio, Ukrajnio, Tanzanio kaj Ebura Bordo. Krome de tio, S-ro Wang sukcese plenumis komercon pri 10 konteneroj da artfajraĵoj kaj petardoj kun s-ro Aleksandar ZAĤARIEV, Bulgario (IKEF 243), malgraŭ malfacilaĵoj pro la milito en Jugoslavio. Kaj s-ro Dong vendis 3 kontenerojn da plastikaj ujoj al esperantistaj komercistoj en Tanzanio. Do ĉinaj membroj pruvas ke komercado surbaze de la lingvo Esperanto praktike eblas.

En la "Laborplano 1998 - 2000" akceptita dum la Ĝenerala Kunveno 1998 en Montpeliero, troviĝas sufiĉe da eblecoj por taŭga kaj celtrafa agado fare de la membroj.

<u>Resumo</u>

Ankaŭ la jaro 1999 alportis al IKEF iom da progreso kaj parte rimarkindan sukceson. La membronombro kun 149 atingis rekordan nivelon kaj la aktivaĵoj entute plialtiĝis.

2000 estas laŭcifere signifoplena jaro, plie ĝi estas la 15a jaro de la fondo de IKEF kaj la lasta jaro el nia Laborplano 1998 - 2000. Ĉiu de ni povas konstati, ke en la sekvaj lastaj 9 monatoj de la laborplano ni ne povos plenumi ĉiujn taskojn nomitajn tie. Do restas por ni la ŝanco plilongigi la validecon de tiu laborplano je pliaj tri jaroj.

Tial ni denove ripetas la alvokon al ĉiuj membroj, ke ili koncentru sin al agadoj el tiu laborplano, por ne disipi sian tempon, forton kaj monon al flankaj, senefikaj agadoj.

Por la Estraro:
Franz Josef Braun

## Financa raporto pri 1999

Sur la mezaj paĝoj de ĉi tiu revuo troviĝas la spezokonto kaj bilanco je 31 decembro 1999.

La spezokonto montras profiton de 729,46 EUR, konsiderinde pli ol dum la pasintaj du jaroj (509,15 kaj 553,15 EUR).

La ĉefa pozitiva ero estas la sumo de 389,74 EUR, makleraĵo pro varbitaj Monato-anoncoj. Sen tio estus malkresko de la profito.

Negative influis la spezokonton i.a. jenaj elementoj:

Estas proksimume 100 EUR malpli da ricevitaj kotizoj, malgraŭ la kreskanta membronombro. Mi vidas tri klarigojn:

* La sumo de 1998 estis escepte alta, pro intensa ĉasado de malfruaj kotizpagintaj
* Por komunaj IKEF/TAKE-membroj IKEF ricevas malpli grandan kotizon.
* Kvankam mankas fidinda statistiko pri tio, verŝajne la proporcio de membroj el landoj kiuj pagas la malaltan kotizon kreskas.

Elspezoj pro terminologia laboro iom kreskis, pro elspezoj prepare al traduko de Inkotermoj, kiu estu preta por la Tel-Aviva UK. Falis la sumo de donacoj (kvankam la alta sumo de 1998 ĉefe originis en repago de elspezoj de estraro kunveno).

La vendo de terminaroj (de kiu cetere nur restas eta stoko) stagnis ĉar ne aperas novaj. Nur la malmultekosta Sindikata Terminaro bone vendiĝas; plurfoje estis kopiita pli kvanto.

La administrado de la komuna kotizsistemo por IKEF/TAKE-membroj evidentiĝis sufiĉe komplika kaj temporaba, por nur malgranda membronombro. Espereble baldaŭ eblos atingi iun "rutinon" pri tio.

Roland Rotsaert, financa konsilanto

## Donacoj

La kasisto dankas pro la ricevitaj donacoj dum 1999:



Lee (11): 21,30 EUR; Bühl (26): 10 EUR; Durand (187): 3 EUR.

## Korespondpeto

Opa Moses Gbetogo, 24jara studento, serĉas korespondantojn. Interesoj: vojaĝoj, interŝanĝoj de poŝtkartoj, tabloteniso. Adreso: p.a. Opa Farms Ltd., P.O. Box 250, Badagry, Lagos State, Niĝerio.

**Thomas A. Goldman mortinta**

Je la 7a de januaro 2000 forpasis en Bethesda (Marilando, Usono) en la aĝo de 82 jaroj nia multjara membro sinjoro Thomas A. GOLDMAN. Li estis dumviva membro de UEA kaj fakdelegito pri ekonomiko. Kun la membro-numero 52 li estis unu el niaj unuaj membroj ekde la fondo de IKEF en la jaro 1985.

Jam antaŭe, de 1980, li eldonis ĉiumonate EBU-on (Ekonomia Bulteno pri Usono). Ni rigardis tion modela agado, kaj ĝis nun vane klopodis establi similan bultenon pri la ekonomia evoluo - almenaŭ kvarfoje jare - por la Eŭropa Komunumo kaj por Japanio. Estis malagrabla mesaĝo por ni, kiam s-ro Goldman pro progresinta aĝo devus ĉesi en la jaro 1994 la eldonon de sia EBU.

Per EBU li pruvis sian emon pri praktika agado por Esperanto, kio ankaŭ kulminas en sia eldiro: "Ni ne fantaziu pri la fina venko, sed eniru la vojon de senĉesa verkado"! (el UEA-revuo ESPERANTO n-ro 3/2000 paĝo 60). Lia forpaso estas grava perdo por IKEF kaj ankaŭ por la tuta Esperanto-movado. Ni gardos bonan memoron pri li.

F.J. Braun

**Novaj membroj**

298. S-ro Janek BENDER, Senefelderstr. 19, D-73230 KIRCHHEIM u. TECK, Germanio, °1967,
retadreso <janek.bender(a)de.bosch.com>

299. S-ro WEN Gang, Beijing Donglu 356 Hao, Sheng Jijie Shigong Gonshi, CN-330029 NANCHANG, Jiangxi, Ĉinio, °1963,
retadreso <lifeng(a)public.nc.jx.cn>

300. S-ro S-ro Emilo MALANDA NIANGA - Esperanto Kultura Movado (EKM), Université de Kinshasa - B.P. 839, Kinshasa XI, Kongo

301. S-ro Deian PARUŜEV, Sveti Sveti Semocislenici Str. 6, Lozenec Kv, BG-1407 Sofio, Bulgario

**Nova dumviva membro**



78. Walter VAN DEN KIEBOOM - WITDOECKT NV, Belgio

**Komuniku vian retadreson !**

Kiel vi jam povis legi en la prezidanta jarraporto, la ĉina peranto de IKEF, s-ro Wang, prizorgas liston de retadresoj de IKEF-membroj. Se vi havas retadreson, nepre informu lin!

**Anoncitaj aranĝoj**

**Londerzeel (Belgio), 1-7 julio 2000**

STUDSEMAJNO pri ekologio kaj kompoŝtado

La tuta studsemajno kostos nur 25 EUR kaj inkluzivas: manĝojn, tranoktadon, lernomaterialon kaj ekskursojn. Ĝi estos ech SENPAGA por homoj el nepagipovaj landoj; ni eĉ subvencios parton de la vojaĝkostoj por 2 homoj el ĉiu lando!

La ĉefa studobjekto estos: kompoŝtado laŭ 100% natura, biologia maniero, SEN multekostaj, kemiaj produktoj. Estas bone por la sano, por la grundo, la medio kaj avantaĝe por evolulandoj.

Por pliaj informoj, kontaktu:
FLEJA (Flandra Esperanto-Junulara Asocio)
Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio
Rete: lode(a)fel.esperanto.be

**Samarkando (Uzbekio)**, 15-20 aŭgusto 2000: AERO-2000 "En la koro de la Granda Silka Vojo", i.a. pri Esperanto en Centra Azio. Informoj kaj aliĝilo: Internacia Muzeo de Paco kaj Solidareco, P.O. Box 76, UZ-703000 SAMARKANDO, Uzbekio, fakse +998(662)310777 (por Ilhom), rete <peacetur(a)samuni.silk.org>.

**Komercaj petoj kaj proponoj**

**Ĉinio**

(A) Mi povas liveri diversajn ĉinajn tradiciajn herb-medicin-aĵojn. (B) Mi povas im-eksporti en ĉiuj sferoj. (C) Mi povas vendi kaj mendi diversajn ĉinajn varojn) aŭ fariĝi peranto kaj komisiato por firmaoj de diversaj landoj en ĉiuj sferoj de komercado. (D) Mi povas akcepti diversajn turismo-delegaciojn. S-ro Wen Gang, Beijing Donglu 356 Hao, Sheng Jijie Shigong Gongshi, CN-330029 Nanchang, Jianĝi; rete <lifeng(a)public.nc.jx.cn>; lingvoj: Esperanto-angla.

Nia kompanio importas manganan ercon (manganese ore) Specifoj: Mn 47% min., P 0.1% maks., Fe 6% maks., $SiO_2$ 15% maks., $H_2O$ 5% maks., Kvanto: 10000-30000 MT, Pago: L/C je 180 tagoj. S-ro WANG Tianyi (Chielismo VON), China Shaanxi Tongchuan Import & Export Co., tel:+86-29-2242215, fakso:+86-29-2232952, rete: <komerco(a)public.xa.sn.cn>, <esp(a)pub.xaonline.com>, <informo(a)komerco.com> <http://komerco.com>

**Rumanio**

Sinjoro Balazs Istvan, patrono de la rumana fotomagazenreto Revo, kontaktiĝus kun persono kiu volus investi en sia entrepreno aŭ kiu laboras en la sama fako kaj estas esperantisto. Adreso: Revo foto, Balazs Istvan, RO-4200 GHEORGHENI, jud. Harghita, P.O.B. 40, Str. Kossuth L.3-9; rete <revo(a)knet.ro>

**Tanzanio**

Aĉeto kaj vendo de malnovaj ĉemizoj; vendo de artaĵoj; transporto; fiŝkaptado; esploro, aĉeto kaj vendo de oro. Espero Enterprises, P.O. Box 2650, MWANZA, fakso 00 255-68-500676.

**Novaj adresoj**

15. Volker HANK, Lindenstr. 2, D-36369 LAUTERTAL-HÖRGENAU, <volkerhank(a)aol.com>

130. S-ro Guido GRATTAPAGLIA, SHIS QI 19 Conjunto 12 Casa 18, BR-71655-120 BRASILIA (DF), Brazilo

242. Mário FONSECA, Nova Mondo Idiomas, Ltda., Caixa Postal 10822, 70300-980 Brasilia - SCS - DF;
rete <marjofonseka(a)esperanto.nu>

247. s-ro DONG Zhongfa, Chengguan Youying-Xiang 21 hao 204 shi, CN-317000 Linhai-shi, Zhejiang, Ĉinio

(anonco)

Viro 55-jaraĝa (maŝinteknikisto) kaj virino 42-jaraĝa (ekonomikistino) konantaj esperanton kaj francan lingvon, bulgaroj, sendependaj de alkoholo kaj narkotiko, ne juĝitaj, sanaj kaj spertaj, dezirus flegi malsanul(in)on aŭ neviglan malaĝul(in)on. Eblas rekomendleteroj el Germanio kaj Belgio.

Skribu al: S-ro Veleslav Ovĉarov, Opalĉenska 22, BG-5300 Gabrovo, Bulgario



## KUNLABORO POR LABORO

Ene de vasta transformiĝ-projekto de niŝa ELEKTRONA INDUSTRIO (EI), kaj je celo laborigi liberajn kaj nesufiĉe laborigitajn eblecojn de EI, plivastigi la produkt-programon kaj atingi pli bonan ĝeneralan pozicion en la merkato, je nivelo de Korporacio estas pretigita aparta programo KUNLABORO POR LABORO, per kiu oni invitas ĉiujn entreprenojn kaj unuopulojn, hejmlandajn kaj eksterlandajn al kunlaborado laŭ la principoj de labora kunlaborado, je ĉiuj formoj de la produktado aŭ servoj kiuj jam ekzistas aŭ eblus realigi en EI.

Por la unua varianto de la programo oni invitas ĉiujn kiuj havas programojn, projektojn, patentojn aŭ nur ideojn, ke oni realigu ilin per la konstruaĵaj, teknologiaj kaj laboristaj eblecoj de EI. Al eventualaj kunlaborantoj oni ofertas:
- financan repagon por la projekto - procenton de ĉiuj venditaj projekt-produktoj,
- komunan investadon kun leĝe registritaj entreprenoj,
- kreadon de aparta leĝe registrita entrepreno.

La dua varianto de la programo konsistas el la produkt-programoj kaj produkt-projektoj kiujn EI jam havas pretajn, sed por kies realigo EI ne havas sufiĉajn rimedojn kaj kie de eventualaj kunlaborantoj oni atendas financan helpon, helpon por atingi konkretajn merkatojn k.s. Je ĉi varianto, al kunlaborantoj oni ofertas privilegion je la var-liverado, komunan fiksadon de la vendo-prezoj, partoprenon je profit-divido k.s.

La tria varianto de la programo estas rezervita por la laboristoj de EI kiuj deziros komenci sian propran laboron per rimedoj kaj eblecoj de EI. Per ĉi varianto al la laboristoj-kunlaborantoj oni ebligas uzadon de certaj laboriloj kaj ejoj de la fabriko - kiuj longe ne estis uzataj kaj kies reuzadon oni daŭre ne planas, pro la malnoviĝo, ŝanĝo de teknologio k.s., sed kiujn oni daŭre iel povus uzi je laboro - per luado aŭ eĉ aĉetado. Ĉi varianto estas ĉefe interna, sed same kiel du unuaj, ankaŭ ĝi havas iajn siajn sub-variantojn kiel ĝi povus esti praktike realigebla.

La projekto estas malferma sistemo kun ebleco je plia disvolvigo dum la praktika realigado, sed pro sia specifa signifo por la tuta sistemo de EI, ĝi estos realigata je nivelo de la tuta korporacio, pro kio oni formos ankaŭ apartan kunordigan teamon aŭ apartan estrar-organon havonta certajn respondecojn.

Kontaktadresoj por pli detalaj informoj:


La Merkato 68

ELEKTRONSKA INDUSTRIJA HOLDING KORPORACIJA, Bul. Veljka Vlahovica 80-82, YU-18000 Nis

Zoran Martinovic, asist. de marketing-direktoro, tel: +-381-18-550 943, 550 762, faks: +-381-18-550 926,
e-poŝto: Ei-Korporacija(a)cent.co.yu

Zoran Ciric (IKEF 218, <zciric(a)eunet.yu>)



**Terminologio**

Asekura terminaro: provleganto serĉata

Asekura terminaro estas preskaŭ prespreta. Enestas pli ol 1200 terminoj en ses lingvoj (EN, DE, NL, HU, FR, ES). Ankoraŭ estas bezonata anglalingvano (prefere el Britio) kiu scias ion pri asekuroj. Kontaktu Marc Vanden Bempt <marc(a)esperantu.nu>.

Radikaro de Esperanto

Al mia paĝo http://www.volny.cz/malovec/radikaro.htm mi metis kiel kromprodukton de mia vortarista laboro la radikaron de Esperanto por helpi aliajn vortaristojn, kiuj intencas krei Esperantan-nacilingvan vortaron.
La radikaro estas pli ampleksa ol en PIV, sed kompreneble sen PIV kaj aliaj paperaj vortaroj ĝi ne utilos. Ĝia tasko estas doni skeleton por la novaj vortaroj, kiun oni poste devas traduki en la nacian lingvon kaj kompletigi per derivaĵoj, frazeologiaj esprimoj ktp. Tamen ĝi povas ŝpari 25% da laboro kaj esti bona starto por novaj vortaristoj.

Al la najbara paĝo http://www.volny.cz/malovec/tec.htm mi almetis rezultojn de Terminologia Esperanto-Centro por helpi al novaj fakuloj informiĝi pri la ĝisnunaj atingoj.

Miroslav Malovec <starto(a)clavis.cz> (ret-info)

Astronomia Vortaro uzas VoKo-n

Mi pretigis la unuan version de la Astronomia Terminaro (AT), por kiu laboras mi kaj aliaj kolegoj. Mi invitas la interesiĝ-antoj viziti nian paĝon ĉe
http://members.xoom.com/astro_esp/terminar/terminoj.htm

La nuna stato de AT estas vortareteska, enhavanta precipe sed ne sole PIVajn astronomiajn terminojn. Tamen ĝi kreskos en la direkto de terminaro, kaj tial ni uzas la nomon Astronomia Terminaro. Unu el niaj plej ĵusaj decidoj estas la uzo de la

perkomputila vortarstrukturo de VoKo, la projekto lanĉita de alia listano: Wolfram Diestel. Lars prizorgas tiujn aferojn. Lia nuna xml-versio de AT estas videbla ĉe http://esperanto.warande.uu.nl/AT/ kaj enhavas nuntempe nur 7 aŭ 8 terminojn, ĉar ni ĵus komencis la transprenadon de la word/html-dosieroj al xml-formaton.

Helio J. Rocha-Pinto <atreyu(a)zipmail.com.br>
tra terminologio-listo



**Reago: Fikciaj entreprenoj ne bonvenas**

Mi ne konsentas kun la artikoleto sur paĝo 12 de LM 67. Tie oni tro miksas informon kun komento. Kial "Fiuloj vendas..."? Precipe ni eŭropanoj konsideru ke similajn aferojn ebligas EU nuntempe al ĉiu civitano de EU, simile kiel ĝi antaŭe eblis jam al grandaj firmaoj.

Mi refondis mian eldonejon en Britio. Se vi volas tiel esprimi, tie ĝi estas "fikcia". Unu ŝildo antaŭ oficejo montras ĝian ekziston. Sed tiu fondo estas tute laŭleĝa kaj estas kompreneble agnoskata en Germanio pri EU.

Sed neniu "fiulo" vendis ĝin kun la intenco ebligi al mi kontraŭleĝajn aferojn. Simple la intenco estis eviti la preskaŭ ne plu venkeblan germanan burokratismon, kiu daŭre plimultiĝas. Krom tiu burokratismo ankaŭ la kosto gravas. Fondi GmbH en Germanio estas longdaŭra kaj altkosta afero. En Britio tio estas tute rapida kaj malaltkosta.

Kial malgrandaj firmaoj aŭ personoj ne profitu el la eblecoj, kiujn ofertas nia libera EU-merkato, se la cirkonstancoj estas tiel favoraj? Nuntempe germanaj firmaoj fuĝas grandnombre al eksterlando kaj registriĝas kutime tuj malantaŭ la landlimo. Tie oni parolas germane, la kondiĉoj estas bonaj kaj oni ne suferas pro la senlimaj germanaj burokratismaj procedoj.

Tial resume, oni ne tiel skribu pri laŭleĝaj eblecoj tiel malbone; precipe multaj esperantistoj povus profiti de EU, se oni bone informus ilin.

Kompreneble Delaware estas alia loko, sed en EU principe la samaj eblecoj ekzistas. Ni uzu ilin tute laŭleĝe por nia sukceso!

Harald Schicke
<harald.schicke(a)t-online.de>; http://www.mz-verlag.de

**Staĝlokoj serĉataj**

Junaj meti-lernantoj kaj studentoj de plej diversaj fakoj pli

kaj pli ofte serĉas staĝlokojn en eksterlandaj entreprenoj. Ĉu ni, membroj de TAKE kaj IKEF, internaciaj asocioj prifakaj, ne estus la taŭgaj homoj por proponi ankaŭ al ne-esperantistoj staĝlokon en niaj entreprenoj aŭ en de ni konataj entreprenoj? Ni rolu kiel perantoj je la servo de junaj fakuloj! Informu nin pri viaj oftertoj kaj petoj!

(TAKE - La Domo, aprilo 2000)